

Laborplano

Ĝenerale (David-Emil Wickström, prezidanto de TEJO)

La laborplano de TEJO por la jaro 2006 ĝis 2007 (ĝis la fino de la nuna oficperiodo) estas strategia papero. Ĝi montras kion la estraro volas atingi.

Ĝenerala strategio

Dum nia oficperiodo la ĝenerala strategio de la nuna TEJO-estraro sekvas kvar liniojn:

1. Videbligado de TEJO
2. Plibonigado de informfluo
3. Aktivula trejnado
4. Oficisto

Observoj dum la lastaj jaroj montris, ke TEJO estas abstrakta organizo kiu estas ligita kun ijk, sed pli ol tio de nia agado ne estas konata. Ni volas ŝanĝi tion kaj igxi pli videbla ene de la junulara esperanto movado. Niaj landaj sekcioj sciu kial la laboro de TEJO gravas, ili sciu kiel TEJO povas helpi ilin kaj ankaŭ kiel ili povas helpi TEJO-n. Ni ankaŭ volas refokusiĝi je nia enhava laboro, nome lingvaj rajtoj, kaj pli koncentriĝi je tio en nia agado kadre de seminarioj, diskutoj kaj lingvaj festivaloj.

Por bone informi pri TEJO necesas bona informfluo. Tio ekas kun la estraro, kiu strebas esti pli travidebla en sia agado kaj pli bone komuniki kaj al la komitato kaj al la junulara movado pri sia agado. Sed ankaŭ gravas plibonigi la fluon inter la komitatoj A kaj iliaj landaj sekcioj, ĉar ili havas rektan aliron al iliaj aktivuloj.

Efika agado kaj taŭgaj laboriloj nepras en la hodiaŭa aktivula mondo. Sed necesas lerni uzi ilin. Pro tio necesas aktivula trejnado rilate al la agado de TEJO. Tio kovras kaj enhavan trejnadon pri ekz. lingvaj rajtoj, kaj trejnadojn fokusitajn je laboriloj necesaj en kampoj kiel informado, organizado de renkontiĝoj ks. Ni volas koncentriĝi je tri specoj de aktivula trejnado:

- a. trejnado dum aliaj e-renkontiĝoj malfermitaj por ĉiuj
- b. trejnseminarioj organizitaj de TEJO
- c. eksteraj trejnseminarioj organizitaj ekz. de la konsilio de eŭropo

La efikeco de la tri menciitaj punktoj dependas de bona struktura stato de TEJO. La problemo de volontula junulara movado estas ke la aktivuloj okupiĝas pri siaj kampoj en sia libertempo. Tamen restas kelkaj taskoj, kiel subvencipetado, kiuj postulas daŭran okupiĝon kaj dediĉon. Pro tio ni volas daŭrigi la laboron de la antaŭaj estraroj pri akirado de oficisto.

Tiuj linioj bone eniras la UEA-agaddirekton "plijuniĝo". Per bone funkcia strukturo kaj informfluo de TEJO ni povas atingi niajn nunajn membrojn kaj ontajn membrojn pli bone. Tiel ni povas videbligi kial gravas membri kaj aktivi en TEJO. Al ontaj aktivuloj ni povas oferti aktivulan trejnadon. Tiel ni povas pli profesiigi nian laboron kaj krei sanan bazon de aktivuloj (komence por TEJO kaj poste por UEA).

Planoj

En la dua parto de la laborplano sekvas pli konkretaj planoj de la estraranoj.

Administrado (Valentina Sidorova, ĝenerala sekretario de TEJO)

Plenumi la taskojn, kiujn postulas la ofico de Ĝenerala Sekretario, priskribitaj en Regularo kaj Reglamantoj de TEJO.

Informado (Chuck Smith, TEJO-estrarano pri informado)

Dum la unua jaro mi plejparte koncentriĝis pri nia retpaĝaro. Dum mi daŭre okupiĝas pri la retpaĝaro kaj plibonigas ĝin, mi ankaŭ volas plibonigi nian informadon en la "papera mondo." Ni devas krei kaj eldoni novan faldfolion, verki artikolojn pri TEJO por naciaj revuoj kaj sendi la revuon Kontakto al diplomitoj de retaj E-kursoj.

Mi planas starigi retan voĉdonan sistemon por la komitato kaj estraro. Cetere, mi translokigos niajn vikiojn al pli bona sistemo. La plej alta prioritato pri la retpaĝaro nuntempe estas ĝia multlingvigxo pri kiu mi nun okupiĝas. Mi ankaŭ volas translokigi la paĝaron de Pasporta Servo al la ĝenerala TEJO-paĝaro kaj krei detalan subpaĝaron por Kontakto.

Landa-Agado (François Hounsounou, TEJO-estrarano pri landa kaj afrika agado)

En esperantujo homoj pli kaj pli interesiĝas pri la junulara movado, kaj la nombro de esperantistaj junuloj, ĉu lertaj aŭ nelertaj, pli kaj pli kreskas. Pro tio, mia laborplano resumiĝas sub kvar diversaj agadkampoj :

1. Informadi pri evoluoj en landa agado
2. Disvolvigo de landaj sekcioj de TEJO
3. Agado en Afriko
4. Agado en Eŭropo

Informadi pri evoluoj en landa agado

- analizi la rezultojn de la granda enketo pri landa agado ALSTOM (Agado de Landaj Sekcioj en la Tejo Mondo)
- enmeti artikolojn pri landa agado en TEJO-tutmonde (TT), por ke ĝi malfermiĝu al la tuta mondo de TEJO. Ideale, konkretigi la planon: ilustrado de plej sukcesaj agadoj en landa agado
 - * aŭ per speciala numero de revuo
 - * aŭ per TTT-ejo
 - * aŭ simple starigi diskutliston « TEJO-landaj sekcioj ».

Disvolvigo de landaj sekcioj de TEJO

- pludisvolvigi landan agadon en Suda Ameriko, Azio, Afriko kaj Ameriko, eble Oceanio.

* per starigo de TEJO-komisiitoj pri kontinenta agado, kie ili mankas (en Afriko, Ameriko kaj Azio)

* per landa agado en kelkaj landoj

- helpi kandidatoj iĝi landaj sekcioj: Nepalo, Belorusio...

- helpi plifortigi renaskitajn aŭ novajn landajn sekciojn: VEJO, ĈEJ, KEJO, NiJEA, Kubo... ktp.

- konkretigi la planon UPSALA (Utiligado de Plej Sukcesaj Agoj pri Landa Agado)

- kontakti observantajn LS-ojn por akiri novaĵojn

- disvastigi la informojn tra komitatanoj

Agado en Afriko

- plialtigi la nombron de TEJO-landaj sekcioj en Afriko.

- organizi Afrikan junularan kongreson en Afriko

- organizi IJK-n kaj trejnseminarion en Afriko

- instigi la junularon partopreni la ILEI-konferencon (ne nur en Afriko sed ankaŭ en Eŭropo)

Agado en Eŭropo

- Plifortigi TEJK

- konkretigi ĝiajn agadojn